

5-a DIMANĈO DE KARESMO – 13-a de marto 2016

KIU EL VI ESTAS SENPEKA, TIU UNUA ĴETU SUR ŜIN ŜTONON **Komento al la Evangelio di P. Alberto Maggi OSM**

El la evangelio laŭ Johano 8, 1-11

[En tiu tempo] Jesuo iris al la Olivarba monto. Sed je la sunleviĝo Li iris denove en la templon. La tuta popolo venis al Li. Jesuo sidiĝis kaj instruadis. Tiam leĝdoktoroj kaj fariseoj kondukis al Li virinon kaptitan en adultopeko; kaj stariginte ŝin en la mezo, ili diris al Li: «Majstro, ĉi tiu virino estis kaptita dum ŝi pekis. En la leĝo Moseo ordonis al ni ŝtonmortigi tiajn; sed kion diras Vi?» Tion ili diris tentante Lin, kaj por havi pretekstojn akuzi Lin. Sed Jesuo sin klinis, kaj per fingro skribadis sur la tero. Sed ili ankoraŭ insistis pri sia demando. Tiam Jesuo levis la kapon kaj diris: «Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur ŝin ŝtonon». Kaj denove Li sin klinis kaj skribis sur la tero. Aŭdinte tion, ili eliris unu post la alia, komencante de la plej maljunaj. Restis Jesuo sola kaj la virino staranta en la mezo. Tiam Jesuo leviĝis kaj diris al ŝi: «Virino, kien ili iris? Ĉu neniu vin kondamnis?». Kaj ŝi diris: «Neniu, Sinjoro». Jesuo diris: «Mi ankaŭ ne kondamnas vin; iru, kaj de nun ne plu peku!».

En la evangelio laŭ Luko troviĝas de unu versikloj, kiujn, dum longa tempo, neniu kristana komunumo volis reteni. En la fruaj tempoj, la evangelioj ne estis identaj. Ĉiu komunumo posedis la sian, kaj ĝin transdonis al la aliaj. Do, kiam ĉe iun komunumon alvenis la evangelio laŭ Luko, tiuj dek unu versikloj estis deprenitaj. Tiuj versikloj poste estis akceptitaj kaj gastigitaj en la evangelio laŭ Johano, kaj ili estas ĝuste tiuj de la hodiaŭa liturgio. Fakte, se ni ilin lokus post Lk 21, 38, kiu tekstas "kaj la tuta popolo venis al Li frumatene en la templon por aŭskulti Lin", ni rimarkus, ke tiu estas la ĝusta kunteksto.

Sed, kial neniu komunumo dum unu tuta jarcento ne akceptis tiun ĉi tekston, kaj dum pliaj kvin jarcentoj ĝi ne aperis en la liturgio, kaj ĝis la 9-a jarcento neniu greklingva teologo ĝin komentis? Pri tio atestas al ni, en la 4-a jarcento, sankta Aŭgusteno, skribante: *"Timante, ke ili kredigus al siaj edzinoj, ke la peko ne estas puninda, ili (tio estas, la anoj de la kristanaj komunumoj) deprenis de siaj kodeksoj (do de siaj evangelioj) la indulgoston de la Sinjoro al la adultintino, kvazaŭ Tiu, Kiu diris 'De nun ne plu peku' estus permesinta la pekadon."*

Do estis la viroj, la edzoj, tiuj kiuj ne volis ĉi tiun tekston, ĉar al ili ŝajnis, ke la indulgo de Jesuo al la adultulino endanĝerigus ilian familion, ilian edzecon.

Ni legu do ĉi tiun gravan tekston, kiu, mi ripetas, hodiaŭ troviĝas en la evangelio laŭ Johano, sed apartenas al Luko, ankaŭ en la stilo.

"Jesuo iris al la Olivarba monto. Sed je la sunleviĝo.... Estas grava tiu emfazo pri la horo "...Li iris denove en la templon. La tuta popolo venis al Li." Ni tion rimarkis plurfoje: kiam la popolo aliras Jesuon, kaj Jesuo klopodas liberigi, kreskigi, maturigi la popolamason, ĉiujfoje reagis la religiaj aŭtoritatuloj.

Ili volas la popolon judi, ne igi sendependa. Fakte *"Tiam... "* Ĵus mateniĝas: probable ili spionis en la mallumo la situacion *"...leĝdoktoroj kaj fariseoj kondukis al Li virinon kaptitan en adultopeko; kaj stariginte ŝin en la mezo, ili diris al Li: „Majstro' ",,,...* Rimarku la hipokritecon de la religiuloj: ili tute ne volas lerni de Jesuo, ili volas nur Lin trompi kaj kondamni *".... `ĉi tiu virino estis kaptita dum ŝi pekis. En la leĝo Moseo ordonis al ni ŝtonmortigi tiajn;"* rimarku la malŝaton en la esprimo; sed kion diras Vi?". Johano (aŭ Luko) komentas: *"Tion ili diris tentante Lin".* La verbo "tenti" estas la sama uzita de Luko koncerne la diablon (Lk 4,1); do tiuj fervoraj defendistoj de la tradicio kaj de la vera kredo vere estas nur iloj de la diablo, *"kaj por havi pretekstojn akuzi Lin.* La teksto estas kruda: la religiaj aŭtoritatuloj anstataŭas la diablon. Kiu estas la diablo? Tiu, kiu tentas, kiu akuzas.

Ĉar la menciita puno estas ŝtonumo, oni komprenas, ke tiu virino fakte estis knabino 12- aŭ 13-jara. En tiu epoko la geedziĝo okazis per du apartaj ceremonioj. Por la unua, la gefianĉiĝo, la virino estis 12-jara kaj la viro 18-jara; unu jaron poste la du gefianĉoj komencis kunvivi, kaj tiu estis la geedziĝo. Adultulino post la unua ceremonio estis punata per ŝtonumo, post la dua per sufoko.

..., kaj por havi pretekstojn akuzi Lin". La demando kaŝas insidon. Ĉia respondo estas al Li malfavora. Se Li diros "Nu, ni obeu la Mosean leĝon", tiu popolamaso, sekvinta Jesuon ĉar en Liaj vortoj ĝi sentis spiriton novan, la eĥon de la amo kaj mizerikordo de Dio, senluziigis kaj Lin forlasos. Se, male, Jesuo diros, en la templo: "Ne, ni ne ŝin ŝtonumu", la gardistoj rajtos Lin aresti pro instigo al malobeo de la Mosea leĝo.

"Sed Jesuo sin klinis, kaj per fingro skribadis sur la tero. Kion signifas la silento, kaj kion la skribado? Tio povas esti resendo al profeto Jeremia: "Ho espero de Izraelo, Sinjoro; kiuj Vin forlasas estos konfuzitaj; kiuj de Vi malproksimiĝas estos skribitaj sur polvo, ĉar ili forlasis la fonton de viva akvo, la Sinjoron" (Jer 17, 13). La evangelio estas kruda: tiuj fervoraj defendistoj de la tradicio kaj de la senkompromisa kredo, tiuj uloj tiel piaj, fakte forlasis la Sinjoron, ĉar en ili bolas sentoj de malamo, sentoj de morto.

Kaj la unua letero de Johano konfirmos: *"Ni scias, ke ni pasis de la morto al la vivo, ĉar ni amas la fratojn. Kiu ne amas, tiu restas en la morto"* (1 Joh, 3 14-15).

"Sed ili ankoraŭ insistis pri sia demando. Tiam Jesuo levis la kapon kaj diris: „Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur ŝin ŝtonon’." Tio ne estas la gesto, kiun ni kelkfoje vidis en pentraĵoj aŭ en filmoj: iu levas ŝtonon kaj ĝin ĵetas. La unuan ŝtonon ĵetis la atestintoj de la akuzo, kaj ĝi pezis proksimume 50 kilogramojn; la kondamnito staris en fosaĵo, kaj la unua ŝtono estis jam mortiga. Praktike Jesuo diras: "Kiu estas senpeka, tiu ŝin ekzekutu". "Kaj denove Li sin klinis kaj skribis sur la tero. Aŭdinte tion, ili eliris unu post la alia, komencante de la plej maljunaj". La plej maljunaj estis la ĉefjuĝistoj de la izraela tribunalo. Kiel unuaj foriras ili.

"Restis Jesuo sola kaj la virino staranta en la mezo". Jen la konkludo, delikata kaj tenera." Tiam Jesuo leviĝis kaj diris al ŝi: „Virino, kien ili iris? Ĉu neniu vin kondamnis?". Kaj ŝi diris: „Neniu, Sinjoro." Jesuo estis la sola senpeka, la sola kiu rajtis ŝin kondamni aŭ riproĉi, sed "Jesuo diris: „Mi ankaŭ ne kondamnas vin; iru, kaj de nun ne plu peku!". Li ne pardonas, ĉar jam pardonis ŝin Dio, Li donas al ŝi la forton, por ke ŝi plu vivu: Li ne ĵetas la ŝtonon, kiu portas la morton, sed la vorton kiu portas la vivon.